# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO*1977*Nº 3*(61)





## KILOMETROJ DE PACO KAJ AMIKECO

Laŭ la plano de la MEM - sekcio de ĈEA Loka grupo de Ĉeĥa Esperanto - Asocio en Jablonec nad Nisou aranĝis la 23an de aprilo sub la aŭspicio de Distrikta Packonsilataro jam la 5an turisman migradon de pacdefendantoj sub la nomo

KILOMETROJ DE PACO KAJ AMIKECO

Partoprenis 450 personoj el multaj lokoj de norda Bohemio, turistoj, gejunuloj, esperantistoj, fajrobrigadistoj, kolektivoj el grandaj uzinoj k.a. La plej spertaj marŝantoj sukcesis en malvarma vetero migri je distanco de 55 kilometroj, aliaj elektis laŭ sia kapablo distancojn je 25 aŭ 15 km. Honoran premion de Ĉeĥa Esperanto-Asocio gajnis membroj de la plej nombra kolektivo, turisma rondeto "Jizerka" el Autobrzdy, la plej granda uzino en Jablonec. La foto de J.Hrnčíř montras la solenan momenton, kiam la rondeta sekretario inĝ.Ota Hübner /maldekstre/ akceptas la premion el la manoj de estraranoj de EK.

LACHEMA N.P.BRNO




Estas sukeraĵo por diabetikoj

SORBIT helpas al diabetikoj eĉ por maldikiĝi

SORBIT je přírodní sladidlo s nižší kalorickou hodnotou, které má všechny vlastnosti potřebné pro použití v kuchyni jako cukr

SORBIT je vhodný zejména pro přípravu pečiva a moučníků pro diabetiky

SORBIT je použitelný jako náhrada cukru při udržování vhodn. tělesné váhy

SORBIT POMÁHÁ DIABETIKŮM ZPESTŘIT SVŮJ JIDELNÍČEK

PRODUKTAS ** LACHEMA n.p. BRNO uzino 6 en NERATOVICE

LA CHE MA

Žádejte v prodejnách POTRAVIN, JEDNOT a DROGERIÍ



## Po osmé v Mělníku

Již osmého setkání esperantistů v Mělníku /22.-24.dubna/ se zúčastnilo celkem asi 200 osob, z toho 68 z NDR, 1 z PLR a 3 ze SSR. Všichni účastníci obdrželi ve svých materiálech jednak program a přihlášku na setkání frekventantů písemných kursů v Poděbradech /27.-29.5.77/ jednak přihlášku do LET Lančov v češtině a němčině, prospekt o Mělnicku, plánek trasy zvoleného autobusového zájezdu a podrobný program setkání.

Seznamovací večer s programem LET Lančov zahrnoval táborové písně při kytaře, scénky a výběr barevných světelných obrazů z táborového života.

Pestrý byl sobotní program. Členové bývalého amatérského souboru Verda Čaro de Julio Baghy /E. Seemannová, dr.P.Sádlo-Páv, J. Vondráček a sourozenci Walterovi/ předvedli téměř kompletně hru B.Shawa Pygmalion. Ukázky spojoval J.Vítek. Odpoledne strávili účastníci prohlídkou Roudnice nad Labem, Kokořínského údolí, Pokliček a hradu Kokořín. Vedoucími zájezdů byli J.Laube a J.Votrubec.

Setkání vyvrcholilo v neděli uměleckým matiné, na němž vystoupili R. Deke z Drážďan /akordeon/, E. Seemannová /umělecká recitace/, dr.P. Sádlo-Páv /violončelo/, J. Hrdličková a O.Velická / ruské, české a francouzské písně při kytaře/, L.Rýznar /magie/ a J.Vítek / Poslední roky Zamenhofovy/, který rovněž program spojoval. Všichni účinkující vystupovali bez nároku na honorář a úhradu cestovného.

Celé setkání, zejména pak matiné, bylo zaměřeno k 60.výročí VŘSR a k dalším esperantským výročím roku / 90.výročí vzniku esperanta, 60 let od úmrtí L. Zamenhofa, 75 let EK Praha, 25 let LET Lančov a 10.výročí místní skupiny/. Jeho politický aspekt zdůraznil zejména přítomný nositel řádů a vyznamenání F. Staněk z Lovosic. Velmi milé bylo rovněž poděkování zástupkyně ZE SSR A. Mahrové, která ocenila umělecké zážitky a přátelskou atmosféru. Již týden po setkání došlo jedenáct poděkování z NDR.

/ vk /

## Slovenští esperantisté sněmovali

Hlavní město Slovenské socialistické republiky, Bratislava bylo od 7. do 9. května dějištěm 7. sjezdu ZE SSR, na který se sjelo asi 300 účastníků z Československa i ze zahraničí.

Sjezd pozdravili v den jeho zahájení v areálu Nové scény zástupci esperantských svazů Bulharska, ČSR, Maďarska, NDR a Polska. Jménem ČES promluvil arch. J.Drlík. Se zprávou o činnosti svazu za uplynulé období vystoupil předseda ZE SSR P.Rosa. Poukázal v ní mj. na aktivní účast slovenských esperantistů ve veřejně prospěšné činnosti.

Součástí sněmování, které mělo převážně kulturně společenský ráz, byla zasedání některých sekcí / zprávu o zasedání Mírové sekce přinášíme v rubrice MEM - peranto /. Sváteční atmosférou se vyznačovala návštěva slavnostního koncertu Čs. rozhlasu v městské Redutě. Úspěch mělo i představení známých košických loutkařů. K dobré pohodě účastníků přispěly turistické exkurse do Pieštan a okolí Bratislavy i tradiční pohostinnost metropole na Dunaji a tamějších esperantských přátel.

/ kni /

## El eksterlando

INICIATOJ EN JUBILEA JARO

Inter la 10a kaj 13a marto 1977 - okazis en Karl-Marx-Stadt /GDR/ la X-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el Bulgario, ČSSR,GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio, kiu pridiskutis problemojn de daŭra kunlaboro inter la reprezentitaj organizaĵoj.La partoprenintoj substrekis la signifon de la 60 jara jubileo de Granda Socialisma Oktobra Revolucio, informis pri la koncernaj iniciatoj entreprenataj. Specialan atenton oni turnis al analizo de la atingoj kaj farendaj taskoj en la porpaca agado esperantista lige kun la Asembleo de la packonstruantoj en Varsovio.Oni pridiskutis formojn de la praktika kunagado en la sferoj de scienco inkl. de interlingvistiko, de kulturo, turismo, reciproka informado kaj kunlaboro kun UEA tiurilate.La konsultiĝon partoprenis ankaŭ gvidantoj de la junularaj sekcioj de la reprezentitaj organizaĵoj.

SLAVNOSTNÍ ZASEDÁNÍ V BUDAPEŠTI

Delegace ČES,kterou tvořili předseda J.Vítek a tajemník Z.Křimský, se ve dnech 25-27.března zúčastnila slavnostního zasedání Maďarského esperantského svazu v Budapešti. V průběhu třídenního jednání byl zvolen nový ústřední výbor,omlazený téměř z poloviny členy ve věku do 25 let. Předsedou byl zvolen bývalý ministr spravedlnosti MLR a poslanec maďarského parlamentu dr. Ferenc Nezvál, generálním tajemníkem svazu zůstává bývalý konzul MLR v četných západních státech I. Kutas a výkonným tajemníkem z povolání T.Vaskó.

Delegace českých esperantistů se zúčastnila slavnostního uložení ostatků básníka J.Baghyho na maďarský Slavín a také společného jednání o organizačních a ekonomických otázkách, týkajících se vydávání a výměny publikací.Účast zástupců ČES přispěla bezesporu k lepšímu poznání problematiky esperantského hnutí obou zemí, a měla by přispět i k oživení vzájemného styku členů obou svazů.

/kř/

SOLIDARECO KUN GUSTAVO

Gustavo estas esperantisto en Ĉilio. Nur iom pli ol 30 jara instruisto li jam du jaroj devas kaŝi sin pro politika persekutado. La lastan jaron li trovis rifuĝon en alilanda ambasadejo en Santiago. Gustavo havas edzinon kaj du etajn infanojn, kiujn li ne renkontis dum du jaroj. Ne estas strange, ke li deziras vivi normalan vivon, kune kun sia familio. Li povas fari tion en Svedio, sed li bezonas helpon. Grupo da stokholmaj esperantistoj decidis helpi pagi la flugvojaĝon de Gustavo de Santiago ĝis Arlanda, kaj kiel sciigas gazeto Espero en kiu aperis tiu ĉi informo,alvokis ankaŭ la ceterajn helpi al la juna ĉilia samideano.

MULTEKOSTA DISKUTADO PRI SENARMIGO

Kiel sciigas bulteno UN kaj NI eldonata de UEA la Ĝenerala Asembleo de UN okazigos specialan seŝion pri senarmigo en 1978.Oni antaŭvidas, ke la sesio verŝajne daŭros 3 semajnojn kaj la tuta sumo por efektivigi la aranĝon estas nun taksata je 1 480 800 dolaroj.Tio signifas, ke UN bezonas 4oblon de la nunjara buĝeto de UEA nur por konferenci, grandparte pro la uzo de pluraj lingvoj.Parenteze menciindas, ke tiu ĉi sumo estas nura guto kompare kun la jara sumo de la eksportado de armiloj tra la mondo t. e. 20 000 000 000 dolaroj /en 1975/, sen kalkuli la ĝeneralajn kostojn de la armado.

OKAZE DE LA UNUMAJA FESTO kaj de la 9a de majo kore kaj frate salutas ĉiujn geesperantistojn de Praha Petro Poliščuk el Taškento, dezirante al ili bonan sanon,feliĉon kaj prosperon en sindona agado por la paco kaj internacia amikeco.

GAZETARA SPEGULO. Artikolo pri MEM sub la titolo Mesaĝo en Esperanto de O.Kníchal aperis en semajngazeto Svět práce la 16.3. o Pri la internacia lingvo informis Zemědělské noviny en la respondo al sia legatino B. Jonášová el Slaný. /7.4./.



## 25 jaroj de SET


Kiel ĝi fakte komenciĝis ? La unuan instigon donis propre la Esperanta kurso, kiu en Třebíč en la jaro 1948 gvidis Th.Kilian kaj kiu entuziasmigis antaŭ ĉio la junularon. En 1950 venis al Třebíč kiel distrikta kleriga inspektoro fervora esperantisto F.Sedláček kaj en la sama jaro li permesis la kurson por junularo, plenumante tiel la peton de alia fervorulo P.Sittauer, juna frekventinto de la kurso en 1948. Tiu arigis ĉirkaŭ si junularon kaj tio estis la unua paŝo al somera tendumado kun Esperanta instruado.

La unuaj tendaroj okazis en la golfo de Chvalatice apud la valbaraĵo de Vranov. Nur en la jaro 1958 SET definitive ekloĝis sur la nuna loko ĉe la golfo de Lančov.

La komencoj estis tre modestaj, kun kelkaj tendoj kaj bivaka forno sub la vasta ĉielo. Sed granda estis la entuziasmo de la esperantistoj el Třebíč kaj ĉiujare komfortiĝis la vivo en la tendaro per io nova.Nun la tendaro povas fieri pri la nova administra konstruaĵo kaj moderna kuirejo. Oni prizorgis kabanetojn kaj sufiĉan nombron da tendoj,do la tendaro kapablas loĝigi 150 personojn en ĉiu etapo. Ĉiu ĉi laboro estis farita senpage ankaŭ helpe de aliaj E-kluboj. En la fundamentaj kursoj estas uzata bonega konciza lernolibro, kiun por SET speciale verkis Theodor Kilian kaj kiun eldonis Kleriga Domo de B.Václavek en Třebíč.

Malnovaj pioniroj Kilian, Sedláček kaj ĉefe Sittauer ne forlasis SET, venis pluaj fideluloj kaj hodiaŭ oni povas diri, ke en sia 25-a jubilea jaro "Lančov" estas en la internacia Esperanta-movado konata nocio. Sed kio estas precipe karakteriza - SET daŭre restas la sama natura tendaro kun romantika etoso kaj aloga societo. Se konsideras ĝian 25 jaran ekzistadon, neniu probable kontestos, ke temas pri unikaĵo en la tutmonda movado. Ni deziru al ĝi multajn pluajn sukcesojn en la popularigo de la bela paca ideo de Esperanto kaj de nia socialisma patrujo.

J. Jičínský



## PAC-KONSTRUANTOJ EN VARSOVIO

Mondsignifan konferencon de la la porpacaj fortoj pertoprenis eĉ delegacio de MEM.
Apuda fotografio prezentas tri personan delegacion,kiuj reprezentis konataj funkciuloj MEM el ČSSR,Bulgario kaj Pollando.

Certe vi ekkonis nian Drahomír Kočvara/maldekstre/,bulgaran samideanon N.Alexiev kaj polan sam.Koszeniak.



## Ni vojaĝu Pollandon

En februaro 1977 laŭ invito de MONDA TURISMO mi vizitis Pollandon por proparoli sendevizan interŝanĝadon de polaj kaj ĉeĥaj esperantistaj turistoj. Komence mi iom dubis, ĉu tia aranĝo estos utila niaflanke, ĉar nialandanoj vojaĝantaj Pollandon rajtas ŝanĝakiri sufiĉege da polaj zlotoj. Problemon tiurilate havas poloj, kiuj ekde tiu ĉi jaro povas interŝanĝi nur 100 Kčs. Tiun ĉi situacion ili strebas solvi, kaj montriĝas, ke ilia solvo estas favora ankaŭ por ni. S-ano Andrzej Grzebowski, estro de la junulara vojaĝagentejo JUVENTUR en Bydgoszcz, organizas vojaĝadon tiamaniere, ke poloj estas eksterlande gastigataj je kostoj de eksterlandanoj kaj rekompence ili gastigas eksterlandanojn en Pollando. Ili ellaboris detalajn tabelojn por pritaksado de reciprokaj servoj kaj dum kelkaj jaroj ili praktikas la reciprokan gastigadon kun esperantistoj en Bulgario, Hungario kaj orienta Slovakio. La reciproka gastigado estas tre avantaĝa ankaŭ por ni, ĉar ekzemple unusola tranokto en bona hotelo en Gdańsk num kostas proksimume 500 zlotojn kaj ĝi ne estas somere akirebla sen anticipa mendo.

La polaj esperantistoj preparis por nia reciproka gastigado bonajn kondiĉojn profitante sindikatajn ripoz-domojn. Tiel ili ebligas al ni partoprenon de folklora festivalo en Toruń kaj Bydgoszcz, de foiro en Poznań, belegan restadon ĉe marbordo aŭ viziton de aliaj lokoj kaj interesaĵoj en Pollando. En la ĉemara feriumejo Wladyslawowo / sur la linio Gdynia -Hel /estas kondiĉoj ĉiuflanke similaj al tiuj de sindikataj somerumejoj en Staré Splavy, nur anstataŭ Mácha-lago etendiĝas tie tre proksima Balta Maro aŭ unu kilometron flanke la golfo de Puck kun pli varma akvo, sed ambaŭ kun belaj sablaj strandoj. La restado tie dum du semajnoj kostus nur ĉirkaŭ 1500 Kčs, per kiuj ni pagus reciprokan gastigon de la polaj gastoj ekzemple en aŭtokampadejo Mělník.

Por la nuna jaro estas malfrue kontrakti la interŝanĝon, sed mi deziras ĝin realigi en 1978. Por ebligi la kontrakton estas necese, ke ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA informu somere, maksimume ĝis oktobro 1977:

1. ĉu ties grupo deziras vojaĝi Pollandon en 1978;
   nombro de partoprenontoj, dezirataj lokoj, datoj kaj longeco de la restado,

2. ĉu oni planas por venonta jaro iun esperantistan aranĝon taŭgan por la polaj gastoj /detalaj kondiĉoj/.

La informojn aŭ eventualajn demandojn skribu al la turisma komisiono de ĈEA, Libor Křivánek, Zborovská 1332, 397 01 Písek.

/ lk /

---

## Eksterlanden komforte - tamen senpage

La turisma komisiono de ĈEA intencas helpi organizadon de prelegoj, pri fremdaj landoj. Prelegon povas efektivigi mem vojaĝinto persone aŭ pere de magnetofona sonbendo, aŭ eventuale per nura skribita teksto, sed prefere ĉiam en akompano de lumbildoj, filmoj, aŭ eĉ per ekspoziciado de interesaj objektoj. Unue estas necese ekscii jenajn informoj: adreson de vojaĝinto, nomon de vizitita lando, tempon de la vizito, ĉu li partoprenis tie esp. aranĝojn, plu estas necese indiki teknikajn detalojn pri diapozitivoj, filmoj, magnetofonaj surbendigoj ktp. Bonvolu anonci tiujn ĉi informojn al: L.Křivánek, Zborovská 1332, 397 01 Písek. Li kompilos liston de ĉiuj disponeblaj prelegoj kaj konigos ĝin al la Esperanto grupoj. La grupoj poste mem traktos kun la vojaĝintoj.

/ lk /



## MEM - peranto

HONORINSIGNOJ AL PACAKTIVULOJ. La 8an de majo, enkadre de la 7-a kongreso de AE SSR en Bratislava, okazis kunsido de la sekcio de M E M. Partoprenis nombraj kongresanoj el inter ĉeĥoslovakaj kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Solenan alparolon faris la sekcia prezidanto d-ro F.Šatura, kiu akcentis la festan aspekton de la aranĝo okaze de la signifaj tutmondaj jubileoj -la 60-a datreveno de Oktobra revolucio kaj la 90-a datreveno de la eldono de la lernolibro de d-ro L.L.Zamenhof. Dum la kunsido estis solene transdonitaj Honorinsignoj kaj diplomoj de MEM al M.Mihálová, J.Mužlay kaj D. Papák pro ilia meritplena kaj longjara porpaca aktivado.

INICIATOJ ATENDATAJ -La plenkunsido de Ĉeĥa Packonsilio, okazinta la 24 an de marto en Prago konstatis la neceson de daŭra informado pri la paca strebado de socialismaj landoj, pri realigo de la Fina Akto kaj senarmigo. Tiucele oni devas plibonigi la edukan aktivadon pere de prelegoj, seminarioj, klubvesperoj, kunlabore kun aliaj organizaĵoj de Nacia Fronto. Estas necese, ke ankaŭ LG ĈEA kaj ties MEM perantoj inkluzivu tiun ĉi temaron en siajn programojn, profitante la planon de Porpaca sekcio. Iliaj iniciatoj estos publikigitaj en Mír, gazeto de ČSPK. Bedaŭrinde oni nur sporade povas profiti tiun ĉi eblecon pro la silentado flanke de LG. Tia sinteno estas apenaŭ komprenebla kaj certe ne pravigebla.

DANKE al František Jindra. Post la 30-jara aktiva agado en la Esperanto- movado s-ano F.Jindra el Česká Třebová decidiĝis fini sian laboron en la terminologia komisiono de fervojista sekcio de ĈEA. La membroj de la komisiono kore dankas al li por lia senlaca kaj sukcesa aktivado, same al lia edzino, kiu ofte ebligis al la komisionanoj kunsidi en la agrabla kaj gemuta medio de la hejmo.

LA FERVOJISTA SEKCIO ankoraŭ havas kelkajn liberajn ekzemplerojn de la gazeto Internacia Fervojisto por ĉi tiu jaro. Kiu havas pri ĝi intereson, povas abonpagi ĉe: S-ino Svatava Helmeczyová, 252 31 Všenory 176.

## El eksterlando

• NOVA GRAVA HELPILO por aktiveco, de diversaj Esperantistaj parlamentaj grupoj estas bulteno Esperanta Kuriero. Ĝi helpas al deputitoj - esperantistoj en diversaj landoj orientiĝi pri aktualaĵoj en parlamentoj de la tuta mondo. Ĝi estas des pli grava, ĉar parlamentaj iniciatoj por la internacia lingvo estas ĉiam pli oftaj kaj signifaj.

---

• NAŬ STUDENTAJ RADIO-STACIOJ en Anglio disaŭdigas kurson de E -o, kiun direktas d-ro J.C.Wels. Ĉi tiu amasa instruado de la internacia lingvo en la britaj universitatoj kune kun vigla laboro en la parlamenta medio pleje karakterizas la britan Esperantan movadon dum la pluraj lastaj jaroj.

---

• PRI KOMUNIKADO EN REJKJAVIKO. Inter la notindaj programeroj de la 62a UK estos ses samtempe kunsidantaj laborgrupoj, kiuj okupiĝos pri unuopaj aspektoj de komunikado interne de la Esperanto-movado / korespondado, delegita reto, eldonado/. Kiel oni scias, la ĉeftemo de la ĉi-jara UK estas Rajto je komunikado.

## El la teknika sekcio

Plua numero de la sekcia bulteno TS informas aperis en majo. Por la vasta publiko povas esti interesa la rubriko "Kiel ni diru ?", kiu ĉi-numere alportas diversajn opiniojn pri la termino "vývojka" en Esperanto. La diskuton kontribuis ankaŭ la akademiano K.Píĉ. Kelkaj liberaj ekzempleroj estas je dispono ĉe la zorganto pri la sekcia informa fako: Inĝ.J.Werner, Kroftova 84, Brno, PSČ 616 00.

Membro de la sekcio Inĝ.Z. Pluhař gajnis PREMION POPOVIĈ por la referata artikolo "Etkvantaj elementoj en la moderna ĥemio de sterkoj", publikigita en "Scieca Revuo", organo de ISAE.

La konferenco de teknika sekcio de ĈEA estas preparata por la 1a-2a oktobro 1977 en Česká Třebová.

Aliĝojn al la sekcio akceptas ĝia sekretario: J.Laube, Alej RA 811, 413 00 Roudnice nad Labem.

# Al plia precizeco

La aŭtoro de la artikolo "Ni evoluigu Esperanton al plia precizeco " en Starto 1976, n-ro 2/54/,p. 7-9, prave atentigas, ke unu el la tn. modaj helpverboj /aŭ modalaj verboj/, nome "devi" kun la adverbo "ne", do "ne devi" /kaj sekve ankaŭ "nen-devi"/ estas uzata konfuze kaj kontraŭsence. Asertante, ke la ekzemploj en Plena Ilustrita Vortaro sankcias tiun ĉi kontraŭsencaĵon, li proponas unuecigi la signifon de "ne devi" laŭ la ĉeĥa "nemuset" kaj la ŝajne mankantan kontraŭan signifon esprimi per la neoficiala /sed precipe en ĉeĥa medio bedaŭrinde sufiĉe abunde renkontata/ "ne darti".

Kiel povas okazi, ke kelkaj parolantoj /kaj eĉ ĵurnalistoj,tradukistoj k.s. /uzas ekz. "mi ne devas diri" en la senco de "estas malpermesite, ke mi diru", kaj aliaj en tute kontraŭa senco, nome " mi ne havas la devon diri, sed mi rajtas, se mi volas "? Ĉu vere en la lingvo de Zamenhof mankis kaj ĝis nun mankas la esprimo por unu el tiuj signifoj ? Ĉu ekzistas ia laŭfundamenta uzo de "ne devi" ? Kaj kial oni tian bazan nocion solvas nur nun,preskaŭ naŭdek jarojn post la apero de la unuaj lernolibroj ?

La solvo estas relative simpla: ni revenu al Zamenhof kaj Fundamento de Esperanto, al la Esperanta sistemo de la moda helpverbo " devi " kun la nea adverbo "ne" aŭ la neaj tabelvortoj. Plena Gramatiko / 3-a eld., 1958, § 91, rim.I/ klarigas: "La ne plenan simetrion de kelkaj lingvaj elementoj oni do povas ankoraŭ konstati ĉe la modaj helpverboj. Dum oni klare distingas: li ne povas kanti /= li ne havas tian povon,rajton/kaj li povas ne kanti /li havas ja la povon, sed rajtas ne uzi ĝin/,tia distingo ne ekzistas, ĉe la zamenhofa uzado, kun devi: li ne devas morti signifas /vidu ĉi-supre/: lia devo estas, ke li ne mortu,dum la neado de la devo mem estas esprimata per: li ne bezonas morti aŭ ne estas necese, ke li mortu. Kaj pri la tria verbo, estas evidente, ke nur nuanceto dividas li ne volas morti kaj li volas ne morti. Kp. §§ 116 kaj 273."Tiun ĉi sistemon ankaŭ Plena Gramatiko praktike uzas, ekz./§ 102, rim. I./:" Oni ne devas konfuzi la ĉi-supran uzon de as en la rolo de estas kun alia, ekstere simila, ...".

Do la ekzemploj en PIV /kiel jam delonge en Plena Vortaro/estas ĝustaj, zamenhofaj, eĉ laŭfundamentaj. Ni citu el la antaŭparolo de Fundamento de Esperanto /6-a eld., 1925,p. V-VI/: "Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon !"

Kiu kulpas pri tio, ke esperantistoj uzas "ne devi" / kaj sekve ankaŭ "nen -devi"/ en du kontraŭaj sencoj ? Ĉu la lingvo mem ? Ĉu ĝia aŭtoro? Certe ne: la sistemo estas donita, multaj zamenhofaj kaj aliaj ĝustaj uzoj estas konataj, sed tre multaj aŭtoroj de lernolibroj kaj aliaj lernilo aŭ ne konsciis pri la problemo /ĉar en ilia nacia lingvo ĝi ne estas problemo/ aŭ ili la problemon preterviddis. La sekvo de tio estas, ke lernantoj uzas analogion kun nacia lingvo /ĉu la propra,ĉu iu fremda/, konvinkitaj, ke ĉiujn nuancojn de Esperanto - gramatiko oni enkapigos en kelkaj horoj ... Sole en du ĉeĥlingvaj lernolibroj mi trovis specialan atentigon pri tiu ĉi problemo.

La unua estas tiu de Eduard Kühnl /Methoda Kühnlova. Úplná methodická učebnice esperanta. 3.vyd. Praha, Kühnl 1912. 142 p./. Tie sur p.67 -a, en la 8-a leciono, legiĝas: Mám /míti/, musím /museti/, smím / směti /, mohu /moci/. Rozlišování a vyjadřování těchto pojmů působí nám v cizích řečech značné obtíže: v Esperantu vystihujeme význam těchto slov mnohem snáze, překládajíce dle smyslu věty. Nejlépe se objasní věc příklady:.. .. /Musím, smím, mohu/: Tato záležitost nesmí se déle odkládati.Tiu ĉi afero ne devas esti plu prokrastata /ne toleras prokraston/.Musíte zůstati doma, poněvadž na ulici si nesmíte hráti. Vi devas resti hejme,ĉar sur la strato vi ne devas /rajtas/ludi. Můžete si hráti doma, ale na ulici nesmíte.Vi povas ludi hejme, sed sur la strato vi ne devas / rajtas/. Ne každý, kdo smí, může. Ne ĉiu, kiu havas la rajton /al kiu estas permesite/,povas. Zde se nesmí kouřiti. Estas malpermesite fumi tie ĉi. Mladý může, starý musí. La juna povas, la maljuna devas.Nemusíte se obávati nebezpečí. Vi ne bezonas timi danĝeron... Kaj sur p.103: Vi ne bezonas timi, ke vi perdos la vojon - Nemusíte se obávati, že zabloudíte.



La alia lernolibro, nome tiu de d-ro G.Žďárský kaj K.Procházka/ Učebnice esperanta. Praha, Bačkovský 1923/ traktas la problemon sur p. 91 jene: "Směti /= rajti, Z.H./ se přeloží podle významu/= estas tradukata laŭsignife, Z.H./... V záporném smyslu /= En nea senco/: Tiu afero ne devas esti prokrastata - ta věc se nesmí odkládati. Mi ne devas danci- nesmím tančiti kaj tuj poste Musiti - devi. Vi devas zorgi pri tio- musíš o to pečovati. Vi ne bezonas timi - nemusíš se báti. Mi ne bezonas esti ĉie - nemusím být všude. /Pozor ! mi devas -musím, mi ne devas - nesmím./La koncernajn ekzemplojn el ambaŭ lernolibroj substrekis Z.H./.

Kontraŭan uzon praktikas la aŭtoro de la plej disvastigita lernolibro por ĉeĥoj, kiu /3-a eld., 1972, p.107/ prezentas citaĵon el la fama letero de Zamenhof al Borovko /trovebla ekz. en Leteroj de L.-L.Zamenhof, vol.1, Paris 1948, p.345/ jene: "Tiu ĉi 'skaja' ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. " La koncerna "ne devas" tekstis ĉe Zamenhof "ne bezonas"; bedaŭrinde por la ok mil lernantoj, pri la ŝanĝo kaj ĝia kaŭzo estas nenia mencio.

Resume: "ne devas" povas signifi nur unu nocion, t.e.kiel ĉe Zamenhof, kiel klarigas i.a. Plena Gramatiko kaj - por ĉeĥoj - d-ro Žďárský kaj Procházka. La alia uzo estas erara, ĉar kontraŭfundamenta.

Koncerne la bedaŭrindan sinonimon de rajti, la prezentitan ekzemplon "ĉiu homo rajtas esprimi sian opinion, sed tamen ne ĉiulande darfas"oni povus anstataŭi per "ĉiu homo rajtas esprimi sian opinion, sed tamen ne ĉiulande povas". Precizeco - en ĉiu lingvo - povas esti optimuma,sed ne maksimuma. Tiudirekte ni evoluigu nian planlingvon, precizigante terminologiojn /kaj en multaj fakoj eĉ kreante ilin/,serĉante trafajn esprimojn por novaj nocioj, kribrante la neologismoj kaj disvastigante la klasike simplajn parolturnojn, proverbojn kaj eĉ idiotismojn. Kaj por novaj lernantoj ni preparu bonajn lernilojn, por lernontoj bonajn informilojn ktp. ktp. Sed ni ne tuŝu la Fundamenton, almenaŭ koncerne tian bazan vortprovizon, kia estas la modaj helpverboj.

Zdeněk Hršel

**Předsednictvo svazu vypisuje**

# KONKURS

**na obsazení místa v sekretariátě svazu**

PODMÍNKY PŘIJETÍ :

KÁDROVÉ PŘEDPOKLADY, ZÁKLADNÍ ZNALOSTI ADMINISTRATIVNÍCH PRACÍ, VEDENÍ POKLADNÍ KNIHY, SKLADOVÉ ÚČETNICTVÍ A EVIDENCE, PSANÍ STROJEM, ALESPOŇ ČÁSTEČNÁ ZNALOST ESPERANTA, ORGANIZAČNÍ SCHOPNOSTI, ZÁJEM O STYK SE ZAHRANIČÍM, NUTNO SE ZÚČASTŇOVAT AKCÍ I MIMO PRAHU. MOŽNO PŘIJMOUT I ZÁJEMCE MIMO PRAHU. BYT NEMÁME K DISPOZICI. NÁSTUPNÍ PLAT 1.500 KČS + ODMĚNY. NABÍDKY S POPISEM DOSAVADNÍ PRAXE A KRÁTKÝM ŽIVOTOPISEM ZASÍLEJTE NA ADRESU SVAZU K RUKÁM Z.KŘIMSKÉHO.

## Vitreroj de Jiří Kořínek

Jam tiam, kiam mi la unuan fojon trafoliumis de Jiří Kořínek, mi donis al mi la demandon, kiel estas eble, ke ĝis nun ne aperis lia originala verko en libra formo. Kaj tiu ĉi demando revenadis ĉiam, kiam nomo Jiří Kořínek aperis inter la premiitoj aŭ okaze de Belartaj Konkursoj de UEA aŭ aliaj similaj eventoj.

Des pli granda merito de la redakcio, kiu surprizis la legantojn de Panoramo pli ol agrable. Ĉar tute certe pluraj travivis dank' al ĉi numero kelkajn belajn vesperojn super la versoj de nia eminenta poeto-tradukisto. Poeto, kiun mi longe admiras, kvankam kompreneble ne ĉiuj poemoj estas al mi same proksimaj. Pli konkrete -mi mem taksas plej alte tiujn kun filozofiaj temoj, ekzemple Hejme, Al la luno ...., Sen homa mezuro, Meditado, Komenco kaj fino, Butono. Laŭ mi guste tiuj ĉi faras el Kořínek grandan poeton.

Sed Kořínek ne estas nur filozofo -li estas ankaŭ atentema observanto, li ŝatas naturon, muzikon .... Krom tio li estas admirinde versopreta, se temas pri ia ajn grava okazaĵo, ies jubileo ktp. Ankaŭ arto -tamen, ĉi tie mi vidas en la aŭtoro kapablan versfaranton, malpli poeton.

Legante la kolekton mi eksentis mankon de unu tono, nome de ampasio; eble similaj temoj kuŝas ie en tirkesto ? Kompreneble esceptoj ekzistas ankaŭ inter poetoj...

Koncerne la tradukojn mi ne estas kompetenta, sed sufiĉas legi la lastan parton de Vinteroj por konstati, ke Jiří Kořínek estas tradukisto unika. Oni nur povas bedaŭri, ke en la volumo aperis pluraj preseraroj.

Eli Urbanová

---

PANORAMO ATENTINDA . Mi elkore dankas pro la lasta Panoramo " Vitreroj " de J.Kořínek, dankas la aŭtoron kaj Ĉeĥan Esperanto-Asocion pro la aperigo de tiu libro. S.Neilande, Riga, Latvio.

---

KOREKTO. En la pasinta numero de STARTO, art. Grava solenaĵo, paĝo 2, skribas J.Kořínek, ke Eva Seemanová recitis ankaŭ siajn versojn Al la patrino. Estas miskompreno, nome aŭtoro de ĉi poemo estas Eli Urbanová.

LETERVESPERO okazos en septembro en Halle, GDR. Skribaĵojn ricevitajn antaŭ la 15.9.1977 oni respondos. Direktu ilin al: Kulturbund der DDR KAG Esperanto Halle, DDR - 402 Halle /S/,H.-u.Th.Mann--Str.28.

---

LA ESPERANTLINGVA TEKSTO de la Universala deklaracio de Homaj Rajtoj estas senpage ricevebla ĉe Informační ústředí Spojených národů, Panská 5, 110 00 Praha 1.

---

EMBLEMOJ KONTRAŬ ARMILOJ estas titolo de speciala suplemento de revuo "Heraldika" el 1972, kiu prezentas emblemojn de urboj suferintaj pro la milito, ekz.Lidice, Coventry, Drezdeno, Stalingrado. La tekstoj estas en sep lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto / fare de T. Balda/. La broŝureto ricevebla por 4 Kčs /plus afranko/ ĉe J.Kokoška, Malá Štěpánská 6, 120 00 Praha 2. Tie oni povas mendi ankaŭ la ĉeĥlingvan fakan revuon Heraldika.... /por 35 Kčs jare/.

---

EKBRULIGIS MI FAJRON EN KOR'. Ĵus aperis la dua eldono de tiu ĉi ukrainlingva libro de N. Andrianova pri la blinda esperantista poeto kaj mondvojaĝanto V.Eroŝenko, kun aldonoj pri la VI-a kongreso de SAT en Leningrado, 1926 kaj kun raraj fotoj prenitaj el la japana monografio pri Eroŝenko. Eldonkvanto 50 mil ekzempleroj.

---

KONFERENCO DE FERVOJISTA SEKCIO. La fervojista sekcio de ĈEA okaziĝos sian konferencon en la tagoj 17-18-a de septembro 1977 en České Budějovice. Sabate antaŭtagmeze efektiviĝos la laborkunsido. Posttagmeze sekvos prelego pri la ĉeval-fervojo Č.Budějovice-Linz, kies jubileojn ni rememoras nunjare: la 150-an jubileon de ĝia ekkonstruo, la 145-an de ĝia ekfunkcio kaj la 105-an de post finiĝo de ĝia servado. Dimanĉe antaŭtagmeze la partoprenantoj vizitos la ŝtatan kastelon Hluboká. La sekcia komitato invitas ĉiujn membrojn kaj ankaŭ la ceterajn interesiĝantojn al la partopreno. Pluajn informojn kaj la aliĝojn vi ricevos ĉe: Inĝ.Lad. Kovář, Felixova 1722, 560 02 Česká Třebová.



Ivan Skála: **Májový sonet**

Dříve než se smekne ranní mlha z hor,
dřív než sejde rosa z bezového listí,
než pekařům oschne těsto na kopisti,
zazní naše píseň, zazní jako chór.

Rudá se zlatou a jarní kytice
nad hlavami dětí, dělníků a matek,
radost vybuchující jak milióny zátek
naplní dnes, Praho, tvoje ulice.

Ten, kdo nad dílem se sklání celý rok,
pracující člověk, který je tu pánem,
se zdviženým čelem kráčí dnešním ránem.

Znovu celá země srovnává svůj krok,
aby každý mohl zpříma pohleděti
dětem do očí a dětem jejich dětí.

Ivan Skála: **Maja soneto**

Antaŭ ol maten-nebulo glitos for,
ol perdiĝos de siringoj rosa brilo,
ol sekiĝos pasto sur bakist-knedilo,
nia kant' eksonos, sonos kiel ĥor'.

Florbukedoj, oro kun skarlat'
super infanar', patrinoj, laborhomoj,
ĝojo eksplodanta kiel korko-milionoj
vin plenigos, Prag', en ĉiu via strat'.

Kiu super verk' kliniĝas dum la jar',
laborul', ĉe ni mastranta suverene,
kun levita frunto paŝas ĉi-matene.

Samritmigas paŝon land' laŭ marŝantar',
por sen hont' rigardi povi en okulojn
de infanoj kaj de ties posteuloj.

Tradukis Jiří Kořínek

## Informace sekretariátu

POČÍNAJE LETOŠNÍM ROKEM se cena za tisk publikací zvýšila o více než 50 %. Ke krytí těchto nákladů je proto využívána inzerce ve Startu. Vážní zájemci, kteří mají možnost získat objednávky na placenou inzerci v našem časopise si mohou vyžádat bližší informace na sekretariátu. Upozorňujeme na výhodné podmínky.

Z ÚSPORNÝCH DŮVODŮ vyjde další Starto jako dvojčíslí /4-5/77/ o rozsahu 24 stran. Uzávěrka 1.září. Příspěvky zasílejte přímo na adresu členů redakční rady odpovědných za své úseky příp.rubriky. Příspěvky pro č.4/5 je nutno jim zaslat s předstihem, t.j. nejpozději v posledním týdnu srpna. Na později došlé materiály nebude brán zřetel.

PLÁN ČINNOSTI SVAZU NA ROK 1978 musí být připraven do 31.7.1977. Žádáme proto všechny vedoucí místních skupin, komisí, sekcí a členy ÚV pověřené dohledem nad činností základních organizací, aby v tomto smyslu dbali o svůj úsek činnosti a připravili si vhodné náměty, včetně financí.

VÝHODNÁ NABÍDKA. Připravili jsme pro vás tři kolekce knih a jiných tiskovin, každou z nich se značnou slevou na ceně. Těm, kteří si objednají všechny tři najednou, poskytne svaz jako prémii tři odznaky / sovětský, s nápisem Esperanto, československý a odznak LET Lančov/. V každé kolekci bude předplatné na Panoramo a Medicinistaj informoj. Nabídka platí do konce roku.

| PAKAĴO A: VALORO 73.-Kčs | rabatita je 59.-Kčs |
|---|---|
| Ĉehoslovakio -Tridek jaroj | 7.- |
| Pri la varmo | 21.- |
| Komenio kaj internacia lingvo | 4.- |
| Kanto super lulilo | 4.- |
| Libro de apokrifoj | 12.- |
| Medicinistaj Informoj -jarkolekto 1976 | 25.- |
| sume valoro | 73.-Kčs |

| PAKAĴO B /+A/: VALORO 107.-Kčs | rabatita je 89.-Kčs |
|---|---|
| Poŝatlaso de la mondo | 20.- |
| Franca arto | 3.- |
| Sileziaj kantoj | 11.- |
| + A = Kčs 73.- sume valoro | 107.-Kčs |

| PAKAĴO C /+B/: VALORO 180.-Kčs | rabatita je 155.-Kčs |
|---|---|
| La perdita vizaĝo | 15.- |
| Paŝoj al plena posedo | 19.- |
| Kultura almanako /printempo/ | 8.- |
| Kultura almanako /aŭtuno/ | 8.- |
| Kultura almanako /Kořínek/ | 16.- |
| Insigno de ĉs.esperantistoj | 7.- |
| + B = Kčs 107.- sume valoro | 180.-Kčs |

ZÁJEMCŮM o dobrý časopis nabízíme HOMO KAJ KOSMO z Jugoslavie. Loňský ročník mohou obdržet za 20.-Kčs. Předplatné na rok 1977 je 30.-Kčs za 4 čísla. Z Jugoslavie jsme vám zajistili rovněž knížku LA MONTARA KRONO od P.Njegoše /vázaná, 273 stran, formát A 4/ za 30.-Kčs.

OBJEDNEJTE SI "MEDICINISTAJ INFORMOJ"! Umožníte tím jejich další vydávání a sobě zajistíte kompletní ročník Starta včetně separátů. Roční předplatné je 25.-Kčs včetně poštovného. Ročník 1976 lze obdržet se slevou - za Kčs 15.



## Korespondi deziras

Pazdernik Erzsébet,1061 Budapest VI, Népköztarsaság u.34 o Kulcsár István, 1399 Budapest p.f. 798. o Levickij Naum, 52j.,310136 str.Traktorostroitelej 103/93 Ĥarkovo,USSR o 27-jara edziĝinita, programisto de elektronaj komputoro precipe kun personoj kiuj intencas viziti Rumanion: Vajda Ioan, str.Dupa Iniste n 44, 2200 Brasov, Rumanio. o JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO HONGO 2- 2- 14 BUNKYO-KU, TOKIO 113 JAPANIO proponas korespondantojn el tiu ĉi lando. Indiku preslitere viajn aĝon, sekson, profesion, hobion kaj adreson. o Inĝ.Jan Šafr, 34j. Ve Střešovičkách 5, 169 00 Praha 6,Ĉeĥoslovakio precipe pri socialisma aŭ komunumamemadministro o Vladimír ROTREKL Palackého 15, 669 00 Znojmo ĈSSR, intersanĝas bildkartojn, glumarkojn kun E teksto kaj diskojn en Esperanto.

## Inter-Klub

PRI LA 15-a SEMINARIO DE ESPERANTO - JUNULARO

La jubilea 15-a seminario okazis la 6-8an de majo 1977 en la kampadejo Račín, distrikto Žďár nad Sázavou. Ĉeestis 60-70 gejunuloj, ankaŭ gastoj el GDR kaj Pollando.

La seminarion organizis membroj - de la Esperantista Klubo en Brno. Prezidanto de la klubo s-ano J.Vondroušek kaj s-anino A. Růžičková persone kontribuis al la programo, en kiu alternis fakaj prelegoj, amuzaj eroj, interparolo kun ĉeestinto de partizanaj bataloj en la apuda Montetaro, ekskurso tra la ĉirkaŭaĵo kaj ne lastvice serioza traktado. La komisiono pri junularagado decidis:

1/ La venonta seminario okazos komence de septembro 1977 en Praha. Ĝi estos orientita al pedagogiko.

2/ Alvoko al la gejunuloj,kiuj pretas helpi al organizantoj de SET Lančov per libervola brigad- laboro. La volontuloj anonciĝu ĉe: Jiří Žák, Okrajová 33, 674 01 Třebíč.

Pri la seminario estis artikolo - en la distrikta ĵurnalo " Vysočina ", n-ro 18, el la 5-a de majo.

## Recenzoj

Ärztlicher Dolmetscher.De Dr.med. Gert Hoyer kaj Dr. med.Uta Hoyer. Leipzig, J.A. Barth 1977. 262 p. , plasta bindo. Prezo 25,--M.Bestell-Nr. 793 471 6.

Se oni malsaniĝas aŭ akcidentiĝas eksterlande, la lingva bariero povas efiki vere malagrable kaj eĉ danĝere. Jen aperas " Kuracista interpretisto ", prezentanta 271 numeritajn demandojn necesajn por kompreniĝo inter kuracisto kaj paciento.

Inter la dek kvar lingvoj uzitaj troviĝas ankaŭ Esperanto,el la neeŭropaj la araba. Vere unika verko, certa vastkampe uzota. Ne estas supozeble, ke la geaŭtoroj mem ellaboris la diverslingvajn tekstojn, la tradukintoj tamen ne estas indikitaj. Tial oni devas riproci certajn malglataĵojn en la stilo /ekz. en la ĉeĥa parto/ kaj eĉ erarojn nur al la aŭtora duopo. La plej granda manko estas, ke la germana demando 22 ne respondas al la tradukoj en la ceteraj dek tri lingvoj. Krom kelkaj preseraroj, en la Esperanto-teksto estas foje uzita "ĉu" anstataŭ " se " /dem. 188/ kaj " ne devas " anstataŭ " ne bezonas ", "ne estas devigata " /dem.240/. Korektinte la mankojn, oni devus havi la libron en ĉiuj kuracistaj kaj flegistaj institucioj, precipe tie, kie oni praktikas la unuan kuracistan helpon.

/zh/

NOVA FAKTERMINARO preta por recenzo. Ĉu vi scias, ke la ĉeĥa lingvo havas specialajn terminojn por blazonoj /heraldikan terminaron/ jam de profunda mezepoko? Ĉu vi scias, ke la unua fakterminaro por priskribado de flagoj kaj standardoj aperis en ĉeĥa lingvo en la j. 1972? Ambaŭ fakoj - heraldiko kaj veksilologio /= flagscienco/ nun jam havas propran terminaron en Esperanto - almenaŭ en manuskripto. Ĝi enhavas 174 paĝojn kaj 760 ilustraĵojn. La aŭtoro nun sukcese traktas pri ĝia eldono kun Terminologia Sekcio de ISAE. Esperanto tiel fariĝos la dua lingvo en la mondo kun preciza terminaro por flagoj - post la ĉeĥa lingvo. Petu informojn ĉe: Jaroslav Klement, kpt. Nálepky 7, 360 04 KARLOVY VARY, Ĉeĥoslovakio.

# ❋ Rondeta vivo ❋

❋B R N O - En tre solena etoso okazis la 19.4.reprezenta koncerto al la 90a datreveno de E-o.Kulminan arton en famaj arioj kaj kantoj prezentis V.Halíř, solisto de Janáček-opero, A.Růžičková - Pavlínová, kiu krome enkondukis unuopajn programerojn, H.Supová - Halířová,kiu ankaŭ gvidis la tutan artisman programon, plue kantis R.Chudoba, ĉiujn piane akompanis P.Kuchař. Gastojn bonvenigis d-ro J.Šikula,antaŭ 140 kunvenintoj parolis J.Vondroušek.

Ekde la 19.4.estas instalita en Universitata Biblioteko ekspozicio pri E-o el materialo disponigita de ČEA kaj en du vitrinoj estas ekspoziciataj kelkdek reprezentaj verkoj de la Esp.literaturo.

❋P L Z E Ň - Okaze de la 90-a datreveno de Esperanto kaj la 20- jara ekzistado de la Esperanto Rondeto ĉe Uzina Klubo ŠKODA,la pilzenanaj esperantistoj preparas la ekspozicion kaj solenan kunsidon inter la 2-a ĝis la 4-a de septembro 1977.

Se vi havos intereson travivi viajn libertempon en arbarriĉa ĉirkaŭaĵo de belegaj lagoj, prenu propran tendon kun dormsako kaj alvenu en Plzeň. Informojn petu: M. Turková, Vrchlického 7, 320 29 Plzeň.

❋P R A H A - Interesan montrofenestreton Esperanto - ZDŠ Lindnerova oni povas vidi ĉe la stacio Libeňský most.

Renkontiĝo de Esperanto - rondeto kaj de esperantistoj el magazeno - Sokolniky okazos la 2-an julio en ZDŠ Lindnerova strato Praha 8 - Libeň.

❋Z N O J M O - Vespero omaĝe al la 60a datreveno de la morto de.L. Zamenhof okazis la 14an de aprilo kun ekspozicio de bildkartoj kaj suveniroj el la tuta mondo, Esp.gazetoj kaj libroj. Pri la verko de la aŭtoro de Esperanto parolis s-ano J. Rotrekl. Partoprenis č.50 personoj, precipe gejunuloj.

❋Ž A M B E R K - Reprezentantoj de ĝemeliĝintaj lokaj grupoj de ČEA el Litomyšl, Polička, Svitavy, Lanškroun, Česká Třebová kaj Žamberk kunvenis antaŭ nelonge en Žamberk. Post la vizito al urba muzeo konatiĝis la partoprenantojn kun la lastaj novaĵoj pri agado de ČEA N.Zedníčková el Lanškroun kaj L. Rýznar el Svitavy, ambaŭ anoj de CK ČEA. La reprezentantoj de LG interŝanĝis reciproke spertojn pri sia poresperanta laboro kaj konkludis,ke la venonta renkontiĝo okazos en Polička.

## KRONIKO

Sesdekjariĝis la 27.4. longjara membro de EK Příbram Jaroslav Z á r u b a.

La 15an de aprilo ĝisvivis sian 75an jaron s-ino Anastázie H l a v a t á , el Znojmo.

Geedziĝis la 18an de junio en Budapeŝto Éva T ó f a l v i kaj Oldřich K n í ch a l.

---

NOVÍ ČESTNÍ ČLENOVÉ ČES

Ústřední výbor ČES na svém zasedání 30.dubna tr. rozhodl o udělení čestného členství ČES za dlouholetou práci v zájmu esperantského hnutí a jeho svazu Evě Seemannové, Praha 3, Roháčova ul.č.29, Dolfu Bartošíkovi, Praha 5, Fráni Šrámka 31, Jaroslavu Maříkovi, Praha 2, Malá Štěpánská 9 a ing. Františku Svitákovi, Praha 9, Teplická 272 .

Blahopřejeme všem vyznamenaným a přejeme jim další dlouhá léta,plná zdraví a plodné práce pro naše hnutí.

---

KLUBO DE Kolektantoj de esperant. insignoj ĉe ČEA akceptas novajn membrojn, kiuj povas ricevi senpage la kluban bultenon. Aliĝu ĉe V. Hasala, p.s. 8, 696 62 Strážnice.

---

DĚKUJEME za peněžité dary svazu M.Majerové, N.Strašecí /15.-/, S. Zedníkové, Praha /65.-/ a T. Kiliánovi, Třebíč /1.000.-/.- Mařík 600,-

STARTO - tiskový orgán ČES. Řídí redakční rada: odp. red. O. Knichal, zást. dr. J.Jermář; členové: J.Cink, Z. Hršel, J.Mařík, J.Vondroušek,ing. J.Werner, ing.V.Kočvara, Z. Křimský, J. Klement. Vychází 6x ročně. Tiskne rozmnožovna Podniku služeb Neratovice
Předáno do tisku 8.6.1977





STAVIVA
národní podnik; krajský závod Brno, tř. Obránců míru 4 dodává stavebniny podnikům socialistického sektoru i soukromým spotřebitelům.

STAVIVA
nacia entrepreno; regiona negocejo Brno, tř. Obránců míru 4 liveras konstrumaterialojn al la entreprenoj de socialisma sektoro kaj ankaŭ al privataj konsumantoj.

MECHANICKÉ A ELEKTRICKÉ PSACÍ STROJE ❋ KALKULAČNÍ STROJE STROJE A ZAŘÍZENÍ PRO VÝPOČETNÍ TECHNIKU ❋ STRÁNKOVÉ DÁLNOPISY ❋ DISKOVÉ PAMĚTI ❋ NAFTOVÉ MOTORY ❋ LOVECKÉ A SPORTOVNÍ ZBRANĚ ❋ MĚŘIDLA, NÁSTROJE A UPÍNAČE ❋ JEDNOÚČELOVÉ OBRÁBĚCÍ STROJE ❋ TRANSFERNÍ LINKY

MEKANIKAJ KAJ ELEKTRO-TAJPILOJ KALKUL-MAŜINOJ ❋ MAŜINOJ KAJ EKIPAĴOJ POR KALKUL-TEKNIKO PAĜAJ TELEAŬTOGRAFOJ ❋ DISKAJ MEMOROJ ❋ NAFT-MOTOROJ ❋ ĈASKAJ SPORT-PAFILOJ ❋ MEZURILOJ, ❋ INSTRUMENTOJ KAJ FIKSILOJ ❋ UNUCELAJ PRILABORAJ MAŜINOJ ❋ TRANSPORT-LINIOJ ❋

# ZBROJOVKA BRNO

národní podnik
nositel
Řádu republiky ❋ Řádu Vítězného února ❋ ❋ ❋ Řádu práce

nacia entrepreno
honorigita per
❋ Ordenoj de Respubliko ❋ de Triumfa Februaro ❋ de Laboro